

# UKRAINA STELO

GAZETO de UKRAINAJ ESPERANTISTOJ

n-ro 3 2016

## OKT-2016 PISIS SUKCESE

paĝo 4



**IVAN FRANKO  
KAJ MIĤAJLO HRUŜEVSKIJ —  
DU KOLOSOJ DE LA UKRAINAJ  
SCIENCO KAJ KULTURO**

paĝo 8



**Floro**

MODERNA UKRAINA BELETRO



paĝo 20

# UKRAINA STELO

gazeto de ukrainaj esperantistoj  
fondita de Oresto Kuzma en 1913  
n-ro 3, 2016

## ENHAVO

Paĝo de la redaktoro..... 3

## MOVADO

OKT-2016 pasis sukcese..... 4

Laŭreatoj de la premio “Oresto  
Kuzma-2016”..... 6

Ankoraŭ unu poŝtkarto..... 7

## JUBILEOJ

La 160-a datreveno de la naskiĝo  
de Ivan Franko kaj

150-a datreveno de la naskiĝo  
de Miĥajlo Hruŝevskij..... 8

Ivan Franko, Mia krimo..... 9

Historio de sola esperantigita verko  
de Miĥajlo Hruŝevskij..... 14

## VIZITO

Neforgeseblaj impresoj  
pri hispanaj esperantistoj..... 17

## ESPERANTO – MALESPERANTE

Aleksandro Logvin Rivereto..... 19

## MODERNA UKRAINA BELETRO

Ĥristina Kozlovska, Floro..... 20

Redaktoro: Volodimir Pacjurko

Arta redaktoro: Niko Voloŝin

La poŝta adreso de la redakcio:

„Ukraina Stelo“, p.k. 26,  
Lucko-18, UA-43018, Ukrainio

La retadreso:

[ukrainastelo@gmail.com](mailto:ukrainastelo@gmail.com)

Ĉion por „Ukraina Stelo“ sendu  
laŭ ĝia retadreso.

La papera versio de la gazeto

mendebblas ĉe Niko Voloŝin

laŭ la retadreso:

[niko\\_helianto@yahoo.com](mailto:niko_helianto@yahoo.com)

Saluton, karaj legantoj! Post apero de la unua reta numero de nia gazeto mi atendis pli da reĥojn bonajn aŭ malbonajn. Sed venis nemultaj. Krom du-tri sindonaj al la gazeto kaj ĝia slogano personoj, neniuj sendis iun kontribuon. Kial do? Eble, kulpis somerumaj zorgoj? Povas esti. Sed venis septembro, kaj vi ĉiuj denove estas hejme. Nia revuo postulas nenian abonmonon. Vi povas transsendi ĝin al viaj amikoj, konatoj enlandaj aŭ eksterlandaj.

Se vi konsideras, ke via esperantlingva nivelo ankoraŭ ne sufiĉas por kontribui al la gazeto, skribu al ni nacilingve. Vi pentras, fotas, studas, esploras, verkas, tradukas? Eble rezultoj de viaj (ŝat)okupoj ekinteresos aliajn. Vi trovas ilin neperfektaj? Ne timu – ni helpas al vi per niaj konsiloj. Ni faros tion publike (laŭdante) aŭ diskrete (se temos pri io netaŭga por ni). Ne forgesu la proverbon „Ne sanktuloj potojn faras“. Do, vekigu, koncentru viaj fortojn – kaj ek, al la kunlaboro kun la gazeto!



Tiu ĉi jaro abundas pri diversaj jubileoj kaj eventoj, do ni penis iomete rakonti pri ili. En la nuna numero de la gazeto vi trovos materialojn pri la jubileoj de Ivan Franko kaj Miĥajlo Hruŝevskij, pri la sciencpraktika konferenco, dediĉita al ili. Ni konigos al vi Esperanto-poeton, nian sampatrujanon Aleksandro Logvin, reprezentantinon de la moderna ukraina beletro Ĥristina Kozlovska, kelkajn novajn paĝojn el la historio de ukraina E-movado. Vi sciigos, kiel aktivis alilandaj esperantistoj, ĉi-foje sur la ekzemplo de samideanoj el la hispana urbo Zaragozo.

Dezirante al vi agrablan legadon, mi ŝatus refoje substreki: nur kune kun vi ni povos fari nian gazeton pli interesa, plaĉa, leginda.

*Ĉiam via Volodimir Pacjurko*



La ĉi-jarajn Tagojn de Oresto Kuzma partoprenis 20 esperantistoj el jenaj lokoj: Kijivo kaj provinco – 3, Lvivo, Ivano-Frankivsko, Ternopolo kaj provincoj – po 5, Lucko – 1, Donecko – 1. Tio estis malpli ol pasintjare (25 personoj), sed samnombre kiel en 2014. OKT-2016 daŭris 4 neplenajn tagojn (je unu tago pli longe ol la antaŭaj).

La programo de la Tagoj estis tre riĉa. En ilia kadro okazis la sciencpraktika konferenco „Ivan Franko kaj Miĥajlo Hruŝevskij – du titanoj de la ukraina kulturo“, dediĉita al la jubileoj de la eminentuloj (respektive la 160-a kaj 150-a datreveno de la naskiĝtago). Ĝin organizis UkrEA kun la memoriga domo-muzeo de O. Kuzma en Kolomeo, la muzeoj de I. Franko kaj M. Hruŝevskij en Krivorivno. La unua plenkunsido okazis en Kolomeo (domo de Kuzma kaj medicina koleĝo), la dua – en Krivorivno, belega hucula vilaĝo situanta en la montaro, ĉirkaŭ 100 km for de Kolomeo. Jam ekde la dua duono de la XIX jc. Krivorivno estis fama somera ripozloko de ukrainaj elitanoj. Ĝin multfoje vizitis Ivan Franko, Miĥajlo Hruŝevskij havis en la vilaĝo sian vilaon. En Krivorivno estis Lesja Ukrainka, Olga Kobilanska, Osip Makovej, Vasil Stefanik kaj aliaj. Ĉi tie Miĥajlo Kocjubinskij verkis sian novelon „La ombroj de la forgesitaj prauloj“ kaj fama Serhij Paradĵanov kreis la samtitolan filmon.

La konferencanoj aŭskultis 6 prelegojn, konatiĝis kun eksponaĵoj de la ĉambromuzeo „Ivan Franko en Kolomeo“ (medicina koleĝo) kaj de la muzeo de Franko en Krivorivno, pririgardis riĉan ekspozicion de esperantaĵoj, kolektitaj de Zinovij Korn

el Krivij Rih, kiu konsistas el E-lerniloj, libroj kun aŭtografoj, beletro, poŝtkartoj kaj poŝtmarkoj, priesperantaj gazetartikoloj, insignoj. Nun tiu ĉi kolekto estas posedaĵo de la memoriga muzeo (parton de ĝi aĉetis ĉe parencoj de la mortinto Vasil Antonjuk, la domposedanto, kaj parton ili donacis al la muzeo).



En Krivorivno ni admiris beleajn pejzaĝojn, sin fotis. Poste nia vojo sterniĝis al Voroĥta. En Voroĥto kvaropo de ivanofrankivskanoj lasis nin kaj veturis hejmen. La planita amika vespero ne okazis – ĉiuj estis lacaj kaj per veturado, do post mallonga ripozo preferis promenadi tra la urbeto, kafumi kaj bierumi. Evidentiĝis, ke loka kablovojo en la momento estas riparata kaj ne povas „transporti“ nin en la montarlon, kie ni planis resti la tutan tagon. Ni estis devigitaj ŝanĝi la planon kaj anstataŭigi la restadon en la montaro per la ekskurso al Bukovelo, urbeto, kiu aperis relative antaŭnelonge, sed jam sukcesis fariĝi fama ripozloko., precipe pro ebleco skii ĉi tie vintre.

Certe, ankaŭ tie ĉi estis interese. Ni uzis kablovojon por veturi al montopinto kaj de tie admiri ĉirkaŭaĵojn, vidi propraokule, kiel aferistoj investas sian kapitalon, fulmrapide konstruante hotelojn, amuzejojn ktp., ruinigante la naturan belecon de la loko. Supre estis bele kaj facile, en la valo ŝokis nin altaj prezoj por manĝaĵoj kaj trinkaĵoj – ve, ne por malriĉaj esperantistoj estas Bukovelo! Kaj, verŝajne, neniam okazos ĉi-loke iu el sekvaj OKT-oj.



Revenante al nia hotelo, ni veturis al Jablunica montpasejo, kiu estas limo inter Ivanofrankivska kaj Transkarpatia provincoj. Promeninte per „unu piedo“ tra la transkarpatia apudlimejo, ni revenis al Voroĥto – ĝi, evidentiĝis, situas tre proksime al Transkarpatio.

Ĉi vespere nin atendis amika vespermanĝo (la plej agrabla programero, kiel ŝerce difinis ĝin unu ĉiamulo de la kolomeaj E-aranĝoj). Oni multe kantis, tostis, ŝercis, mal-



kovris ĉe la Ivovanino (ivanofrankivskanino?) Irina Lisenko brilan talenton de festenestro.

Sekvamatene ni faris amikan rondon, ĉar ankoraŭ tri partoprenantoj ne povis kun ni veturi, kaj prenis kurson al Jaremĉo. Ĝi, kiel ankaŭ Kolomeo, situas ĉe Pruto. Ĉi tie ni admiris bruon akvofalon, virinoj elspezis lastan monon, aĉetante sekigitajn boletojn kaj diversajn bagatelaĵojn.

Kaj jen – denove „nia“ domo. Kiu ne sukcesis rigardi muzeon en la unua tago, tiu havis eblecon tion fari nun. Mastrino Luba rapide preparis teon, kafon, buterpanojn. Mastro Vasil faris individuan ekskurson tra la muzeo por doneckano s-ro Dmitro. Al kelkiuj tiel plaĉis hejma etoso, ke ili pretis resti ankoraŭ kelkajn tagojn. Sed honoro avertis: tempas fini. Ni adiaŭis Kolomeon, esperante denove renkontiĝi ĉi tie venontjare.

## Laŭreatoj de la premio „Oresto Kuzma“-2016

La premio „Oresto Kuzma“ estis fondita en la jaro 2013 de UkrEA, memoriga domo-muzeo de O. Kuzma en Kolomeo, Kolomea-Ĉernivca Eparkio de Ukraina Grek-katolika Eklezio. Ĝi estas mondonaco destinita por ukrainaj esperantistoj kaj personoj, kiuj per sia praktika agado grave kontribuis al popularigo per Esperanto de la ukrainaj literaturo, historio kaj kulturo en la mondo, propagando de la ideoj de la internacia lingvo, studoj de la historio de E-movado en Ukrainio, kreo de lerniloj kaj vortaroj por lernado de Esperanto.




La ĉi-jaran premion dividis:

**Viktor JASKOVEC** (Ivano-Frankivsko) pro grava kontribuo al studoj de la historio de E-movado en Orienta Galicio kaj **Ihor DRUL** (Lucko) pro multjara aktivado en la ukraina E-movado kaj kreo de „Esperanta-ukraina proverbaro“.



Mi volas danki ĉiujn iniciintojn kaj organizintojn de ĉiujara E-aranĝo “Oresto Kuzma-Tagoj”. Ankaŭ mi dankas pro alta takso de mia modesta kontribuo por OKT kaj ke oni gratifikis min per ĉiujara premio “Oresto Kuzma”. Ĉi tiun premion mi ricevis pro la E-agado, do ĝi devas servi por apogi tian agadon. Tial, laŭ mia decido, tuj post la ricevo mi transdonis la premion en apogfonduson de klubo “Ĉekarpata Stelo”. La fonduson iniciatis Roman Mynda, kiu nun loĝas en Germanio. Dank’ al tiu fonduso membroj de la klubo kelkfoje partoprenis E-aranĝojn, kaj ankaŭ ĉi-jare estis eldonita poemaro “Velkinta foliario”.



Dankon. Viktor Jaskovec


## Ankoraŭ unu poŝtkarto

La 19-an de aŭgusto ĉi-jare Kolomeo festis sian 775-jariĝon. Inter diversaj aranĝoj, dediĉitaj al la jubileo de la urbo sur Pruto, estis ankaŭ plenumo de la kanto „Vin invitas al si Kolomeo“ en diversaj lingvoj: ukraina, pola, germana, angla, franca kaj Esperanto. Esperantigis la kanton kaj ĉeestis dum ĝia plenumo Petro Palivoda. Lia traduko estis la plej bona, ĉar ĝi ĝuste transdonis ne nur la enhavon, sed ankaŭ ritmon, kio ne ĉiam eblas en alilingvaj tradukoj.

En la kadro de tiu ĉi projekto fama kolomea advokato kaj eldonisto Miĥajlo Petriv aperigis poŝtkartojn kun la tradukitaj tekstoj de la kanto. Desegnaĵojn por ili faris Volodimir Miĥalĉuk.

La esperanta versio estas jam la kvara laŭvice poŝtkarto kun surskriboj en la internacia lingvo eldonita en Kolomeo en la

novaj tempoj. La du unuaj – portreto de Oresto Kuzma kaj lia domo (kiu servis ankaŭ kiel redakciejo de „Ukraina Stelo“) aperis en la jaro 2013. La tria poŝtkarto, aperinta en la pasinta jaro, prezentis la portreton de Vasil Atamanjuk kaj esperantigitan kolomejkon. La ĉiuj kvar laŭdinde daŭrigas bonan aferon de O. Kuzma, kiu la unua en Ukrainio eldonis serion da poŝtkartoj kun esperantaj tekstoj (artikolon pri tio legu en la sekva numero de nia gazeto).



# IVAN FRANKO KAJ MIĤAJLO HRUŜEVSKIJ – DU KOLOSOJ DE LA UKRAINAJ SCIENCO KAJ KULTURO

La jaro 2016 estas riĉa je diversaj jubileoj. Inter ili estas 2 la plej gravaj – 160-a datreveno de la naskiĝtago de Ivan Franko kaj 150-a datreveno de la naskiĝtago de Miĥajlo Hruŝevskij.



Iván Frankó (naskiĝis la 27-an de aŭgusto 1856 en la vilaĝo Nahujéviĉi de Drohobiĉa distrikto, mortis la 28-an de majo 1916 en Lvivo) – ukraina prozisto, poeto, tradukisto, literaturhistoriisto, sciencisto, socia kaj politika aganto, etnografo, poligloto. Doktoro de filozofio (1893, Viena universitato), honora doktoro de Ĥarkova universitato (1906). Verkis ukraine, pole, germane, ruse. Homo de enciklopediaj scioj, treege laborema. Por plena eldono de la verkaro de Ŝtonhakisto (popola nomo de Franko) necesus 100 volumoj. La plej ampleksa ĝisnuna eldono konsistas el 50 volumoj (Kijivo, „Naukova dumka“, 1976-1986). 78-paĝa antologieto de Franko-verkoj, tradukitaj en Esperanton, aperis en Lucko en 2008 (el-donejo „Nadstirja“, kompilinto Viktor Pajuk).

Miĥajlo Hruŝevskij (naskiĝis la 29-an de septembro 1866 en la urbo Ĥolm, nun Pollando, mortis la 24-an de novembro 1934, en Kislovodsk, Sovetio) – ukraina historiisto, socia kaj politika aganto, Prezidanto de Centra Konsilio (parlamento) de Ukraina Popola Respubliko (1917-1918), multjara prezidanto de la Scienca Societo „Ŝevĉenko“ en Lvovo, akademiano, aŭtoro de pli ol 2000 sciencaj verkoj. Lia fundamenta verko estas multvoluma „Historio de Ukrainio-Rusjo“. En la jaro 2002 Lviva eldonejo „Svit“ komencis eldoni plenan, 50-voluman verkaron de Hruŝevskij. La sola esperantigita verko de Hruŝevskij „Resumo de ukraina historio“ (tradukis O. Kuzma) aperis en „Ukraina Stelo“ (n-roj 2 kaj 3-4, 1922). Samjare en Stanislavovo (nuna Ivano-Frankivsko) la artikolo aperis broŝurforme.





Ivan FRANKO  
**MIA KRIMO**



Ne, mi ne eltenos! Mi ne povas pli longe persisti! Nepras publike konfesi la krimon, kvankam mi antaŭsentas, ke mia animo pro tio ne malpeziĝos. Ĉar ĉiokaze rekompenco neebbla, ĉar kia kontentigo povus rekompensi senkulpe verŝitan sangon, anstataŭi ĉesigitan vivon!

Teruras min, kiam tiu malfeliĉa okazaĵo klare, kun ĉiuj detaloj, aperas en mia memoro. Multaj jaroj jam de tiu tempo, certe pli ol tridek. Mi estis tiam malgranda vilaĝa knabo kaj kuradis, ludante, tra arbaroj kaj kampoj de mia hejma vilaĝo.

Ĝuste alvenis la printempo, la unuaj varmaj tagoj. Post la longa vintra mallibero en malvastaj kabanjoj, ni, vilaĝaj knaboj, la unuan fojon povis libere iom kuri. Ni elkuris sur la herbejon, kiu estis ankoraŭ nuda kaj griza pro la antaŭ ne longa malapero de la vintra kovrilo. Nur tie kaj tie trapikis la teron freŝa verdaĵo. Nur en la apuda arbaro la tero blankiĝis pro floranta simforikarpo, blue makulita per safrano.

Super ni tremis la blua ĉielo, ridetis la suno, kaj la malproksimaj pintoj de la Karpatoj brilis per potencaj neĝoĉapoj similaj al la lumaj diamantaj kronoj. Sed ilia beleco ne tro kortuŝis nin, ĉar ĉiumomente ni sentis la malvarman vintran blovon kiu fluis de ili malsupren oriente. Ankaŭ la rivereto sentis tion. Matene ĝi fluis pure kaj klare kaj murmuretis mallaŭte kiel en somero, sed nun ĝi kolere klakadis inter ĝiaj mallarĝaj bordoj kaj premis malsupren siajn malpure flavajn kolerajn ondojn: tio estis ĝuste la brilaj diamantoj fanditaj de l' printempa suno.

Sed ĉio ĉi ne sukcesis malhelpi nian printempan ĝojon. Ni vagis, saltis kaj kuris ĉirkaŭe, kaj vizitis ĉiujn konatojn: la maljunan potencan kverkon ĉe la arbaro, sur kies gigantaj branĉoj somere ni vetrampis kun sciuroj; la altan klinitan betulon kun funebre pendantaj branĉetoj kiujn ni, je granda malkontento de la arbaristo, uzis kiel balancilon; la silentan fonton en arbara densaĵo, kie ni, ofte embuskis vespere inter arbetoj, observante la vulpojn, melojn kaj aprojn, kiuj venadis trinki akvon; kaj fine la profundajn, klarajn riverojn, kien ĉiudimanche kun fiŝhokoj logis la ezokojn, kaj kiam la suno tro fajris, kun krioj kaj ridego freŝiĝis en la pura kaj malvarma akvo.

Nune, verdire, ĉirkaŭe estis sufiĉe nude kaj malgaje, kaj en la akvo, kiu somere ĉiuloke moviĝis pro ezokoj kaj aro da ruĝkoloraj plotoj naĝantaj gvidate de unu plej



La poŝtkarto eldonita en la jaro 1913 omaĝe al la 40-jara verkista jubileo de Ivan Franko. Surskribo sur averso: D-ro Ivan Franko. Ukraina scienculo, poeto kaj verkisto (1913 estas jaro de lia 40-jara verkista jubileo). Reversa surskribo: meze ĉe la supra rando: POŝTA KARTO. Ĉe la maldekstra rando: 30 % чистого доходу на дар для И. Франка. Eld. «Ukraina Stelo» esperanta gazeto en Kolomeo 360 Nova. Meze sub la surskribo «Poŝta karto» vertikale: УЧИТЬ СЯ МІЖНАРОДНОЇ МОВИ «Есперанто». En la dekstra parto : surskribo «Ad» kaj linioj por skribi la nomon de ricevonto kaj adreson.

granda, nuntempe estis silenta. Sed ni, ĉiupaŝe, scivole observis la akvon, ĉiun bastonon, ĉiun velkitan foliaron, ĉiun karikaron ĉu eble sufokiĝis sub glacio iu ezoko, aŭ eble moŝta lutro vizitis la fiŝan anaron.

– Ps! Pss! – eksiblis subite du aŭ tri knaboj, kiuj iris antaŭ mi, kliniĝis al la tero kaj ekrampis mallaŭte antaŭen, penante ĉirkaŭfermi arbuston.

– Kaj kio estas tie? Kio estas tie? – ekdemandis mi ankaŭ mallaŭte.

– Birdo! Birdo! ĉu vi ĝin ne vidas?

– Kie ĝi estas? Kie?

– Jen ĉi tie en la arbusto. Kaptu. Tiaspecan ni ankoraŭ ne vidis. Verŝajne, ĝi ne flugas, sed nur kuras.

Ĝis kiam la knaboj ĉirkaŭiris la arbuston, mi iris rekte en la arbuston, singarde disklinis la densajn branĉojn kaj vere, ekvidis malgrandan birdon, kiu kaŝiĝis en la pasintjara kariko. Mi ne scias, ĉu ĝi estis malfortigita, aŭ timigita, sed, ekvidinte min

super si, ĝi nek forflugis, nek kuris kaj mi havis ĝin sammomente en la mano. Ĉiu knaboj alkuris por vidi mian kaptiton.

– Ho, kiel bela!

– Tian birdeton mi ankoraŭ neniam vidis.

– Vidu nur ĝiajn okulojn!

– Kaj ĝia plumaro.

Ĝi estis malgranda marĉbirdeto, kiu en nia submontara regiono aperas tre malofte. Ĝia plumaro estis cindre griza kun delikata perla brilo, la beko maldiketa, malhele verdeta kaj similaj longaj, delikataj piedoj. Ĝi sidis silente, kaŝita en mia pugno, ne batis per flugiloj, ne gratis kaj ne bekpikis, kiel tion faras ordinare alispecaj sovaĝaj birdoj, kiam oni ilin kaptas en la manon.

– Kion vi faros kun ĝi? – demandis min kelkaj knaboj, rigardante per avidaj okuloj la belan kaptajon en mia mano.

– Mi portos ĝin hejmen.

– Ĉu vi rostos ĝin?

– Ĉu mi scias? Mi ĝin nutros.

– Ĉu vi scias, kion ĝi manĝas?

– Mi vidos. Se ĝi ne manĝos panon, eble ĝi manĝos muŝojn, kaj se ne, do vermojn, se ne vermojn, do limakojn aŭ kanaban semon aŭ milion. Mi jam trovos ion por ĝi.

Mi vere portis la malgrandan, belan birdeton hejmen kaj metis ĝin ne en kaĝon, nur inter la duobla fenestro, kie ĝi povis pli oportune kuri kaj flugi, havis pli da lumo kaj aero. La birdo ne flugis, nek baraktis, nur kuradis laŭlonge de la fenestro, tie ĉi kaj tie frapetante per sia maldika beketo kontraŭ la vitro, kaj ĉiam, kiel al mi ŝajnis, reve rigardis en la vastan liberan mondon. Jam haltis, klinis la kapeton aŭ turnis ĝin flanken, per unu okulo, ŝajne rigardante la branĉojn de apuda pomarbo, kaj poste kapjesadis tiel malĝoje, kvazaŭ ĝi volus diri:

– Ho, tie ekstere estas tiel bele kaj varme, sed mia printempo perdita! Mi estas en mallibero!

Min kvazaŭ io pikis en la koron, kiam mi dum kelka tempo observis tiun birdeton. Mi mem malĝojiĝis.

– Liberigu ĝin! Por kio vi tenos ĝin ĉi tie! – flustris io interne de mi.

– Sed ĝi estas tiel bela! Mi ja ĝin kaptis! – respondis mi persiste al mi mem. – Eble ĝi alikutimiĝos. Ke mi nur sciu, per kio mi ĝin nutru.

Pro nutrado mi vere havis sufiĉe da klopodoj. Mi metis al la birdo kelkajn panerojn, dekkelkajn semojn miliajn kaj provizon da dommuŝoj, ĉiun speco de nutraĵo en aparta pura konko, aparte freŝan akvon kaj foriris, por lasi ĝin trankvila. Kiam vespere mi revenis hejmen kaj enrigardis al mia birdeto, ĝi eĉ ne tuŝis la manĝaĵon, nur sidis en angulo, alte supren streĉis la maldikan koleton kaj, eĉ ne okulmovinte, rigardis eksteren tra la fenestro, kie puprurflamante subiradis la suno post la neĝan ĉapon de montosupro, kaj de tempo al tempo ĝi kapjesadis tiel malgaje kaj senespere, ke mi ne povis ĝin pli longe rigardi.

Eble, ĝi estas nokta birdo – pensis mi, – kaj ĝi manĝos dum nokto. Tiu penso iom min trankviligis kaj mi forte dormis kaj ne pensis pri la birdo. Tuj matene, preskaŭ

## jubileoj

tagiĝe, mi denove kuris en la ĉambrom enrigardi la fenestron. La birdo sidis ĉiam en la sama loko, kie mi ĝin vidis hieraŭ, ĉiam streĉante supren la koleton, kaj ĉiam, ne okulmovante, ĝi rigardis tra la fenestro en la vastan liberan mondon tie post la vitraj kvadratoj, kapjesante foje kaj foje. La nutraĵon ĝi eĉ ne tuŝis.

– Ellasu ĝin! Liberigu ĝin! – ekkriis io al mi interne. Kial mi ĝin turmentu? Ĝi mortos ja pro malsato.

– Ne, – respondis la alia, obstina voĉo en mi, – mi nepre trovu, kion ĝi manĝas! Mi havigos al ĝi limakojn, vermojn kaj ranovojn.

Mi ne komprenas, kial mi ekpensis ke ĝi manĝos ranovojn. Mi tuj kuris la paŝtejon, kolektis provizon da malgrandaj limakoj, fosis vermojn kaj el la marĉeto plenmanon da ranovoj. Ĉion ĉi mi alportis al mia kaptito. Ĝi eĉ ne atentis min, kiam mi tiun bonaĵon antaŭmetis, montris nek timon, nek eĉ etan intereson, nek eĉ eran apetiton kontraŭ tiuj frandaĵoj. Ŝajnis, ke nur la suno, varmo kaj printempo tie en la vasta libera mondo okupis ĝian intereson.

Tiutage mi havis ian okupon, tial mi foririnte, revenis nur vespere. Mi rapidis vidi la birdeton. Ĝi kuradis malpeze, kapjesante laŭlonge de la fenestro, kaj eĉ ne tuŝis la manĝaĵon.

– Stranga mirindaĵo! – mi ekpensis kaj volis tuj ĝin ellasi libera. Sed mi ekpensis, ke nun ĝi estas certe laca kaj ne flugpova, kaj se mi tuj vespere ĝin ellasos ie en la korto, ĝi facile fariĝos apetitiga akiro por nia kato. Prefere ĝi tranoktu hodiaŭ ankoraŭ ĉe mi. Kaj morgaŭ frumatene mi reportos ĝin en la lokon, kie mi ĝin kaptis kaj ellasos ĝin.

La postan tagon ellitiĝinte matene, mi saltis al mia kaptito. Ĝi denove prenis nenian manĝaĵon kaj sidis malfortiĝinte kaj lace en la anguleto, ĉiam rigardante tra la fenestro en la liberon. Ĝi lasis sin trankvile manpreni kaj ekrigardis min per la samaj nedireble malgajaj okuletoj, per kiaj ĝi rigardis tra la vitroj al la suno kaj al la branĉoj de la pomarbo. Foje ĝi eĉ kapjesis, kvazaŭ dirante:

– Jes, jes, mi jam scias, kien oni min portas. Mi de longe jam sciis ke tio okazos.

Mi portis ĝin en la korton. Ĝi sidis trankvila en mia mano. Mi sentis ĝian molan plumaron kaj ĝian varman korpon.

– Bongusta devas esti ĝia viando! – traflugis la penso mian kapon, – kial mi ĝin ne buĉu kaj rostu?

– Lasu ĝin! Lasu ĝin! – flustras interne mia bona anĝelo. – Vi ja vidas, ĝi estas tiel malgranda. Eĉ la penon ne valoras – ĝin rosti.

– Sed domaĝas ĝin ellasi! Mi ja ĝin kaptis! – ribelis mia infana obstineco.

– Lasu ĝin! Lasu ĝin! – petkaresis io mallaŭte en la plej profunda ejo de mia animo. Kaj la birdeto sidis trankvile kaj rezigne en mia mano. Mi malfermis la pugnon – ĝi ne forflugis. Io abomena, malica ektriumfis en mia interno.

– Vidu! ĝi mem ne volas! Vi ja ebligis al ĝi la forkuron, kial ĝi ne forkuris!

– Sed ĝi estas malforta kaj malsatigita, – flustris io mallaŭte en mia animo.

– He, kion! – ekkriis la infana obstino kaj en la tuja momento mi fortordis la kapeton de la eta, bela birdeto. Ĝi ekskuis unu aŭ dufoje per siaj delikataj piedetoj, el la koleto ekgutis du-tri sangogutoj, kaj la malgranda, bela birdeto ne vivis plu. En mia manplato kuŝis malvarma senanima kadavro.

Kaj per unu fojo rompiĝis, disiĝis mia tuta obstino, furiozo, egoismo. Mi klare ekkomprenis, ke mi jen faris ion sensencan, abomenan, ke mi plenumis senkoran mortigon, ŝarĝis min la krimo, kiun mi neniam elpentos kaj repreĝos. Mi ja neniigis tute sencele tian belan, senkulpan vivon! Jen ĉi tie, en la libera dia mondo, antaŭ la okuloj de tiu bela, varma printempa suno, mi verdiktis kaj plenumis neniel motivitan mortigon. Nun mi sentis tute klare kaj precize, ke la mortigo estis plene sencela. Ĉar tiun malfeliĉon mi povos nek prepari nek manĝi. Ne, mankis al mi la forto eĉ ankoraŭ foje ĝin vidi. Mi lasis el la mano la malvivan birdeton kaj hontigitate, malgaje, premegite kaj konsternite, mi forkuris, for de ĝi, por ĝin ne vidi, por forviŝi el la animo eĉ la rememoron pri ĝi. Mi tre volis plori, sed mi ne povis; io kvazaŭ per prenilo kunpremadis mian animon kaj tiu ne povis elverŝi en larmoj sian doloron. Malgranda, bela birdeto kuŝis en mia animo, kaj mi portis ĝin kun mi, kaj ĉiam ŝajnis al mi, ke ĝi rigardas min per siaj malgajaj okuletoj, rigardas kun mallaŭta rezigno, kapjesas kaj diras:

– Ho, mi sciis, ke pereis mia printempo, ke la mallibero estos samtempe ankaŭ mia morto!

En la mola sentema infana koro ne longe daŭris tiuj ĉagrenoj. Post du-tri tagoj mi jam forgesis la birdeton kaj ĝian kruelan sorton. Mi forgesis, ŝajne, por ĉiam. La impresoj de mia krimo kaŝiĝis ie en malluma anguleto de mia animo kaj iom post iom kovris, dormigis kaj surŝutis ĝin aliaj impresoj, aliaj rememoroj.

Tamen ĝi ne formortis. Pasis plenaj dudek jaroj, kaj kiam falis sur min la unua sortobato, kiam mi juna, kun koro plena de flama viv- kaj amdeziro, meze de belega somero velkis kaj malgrasis en malliberejo kaj perceptis la disreviĝon de ĉiuj miaj esperoj, kiam senkompatate oni ĉifis, piedpremis, ruinigis kaj detruis ĉion, kion mi opiniis la plej kara trezoro de mia animo, tiam, dum terura sendorma nokto aperis antaŭ mi tiu malgranda bela birdeto, pikis mian koron ĝiaj malgajaj, plenrezignaj okuletoj: konfesis al mi ĝiaj malrapidaj movoj tiun satane teruran frazon:

– Ho, mia printempo pereis! Mi en mallibero! Mi jam scias, scias kiel tio finiĝos.

Kaj de tiam mi ne plu povas liberiĝi de tiu rememoro. Ĝi venas al mi ĉiun ĝojan momenton, rompas mian forton kaj kuraĝon en la malfeliĉoj. Ĝi turmentas mian konsciencon per riproĉoj kaj ŝajnas al mi, ke ĉio malsaĝa, sencela, malica kaj malbela, kion mi nur faris en mia vivo, kristaliĝis konkrete, formante tiun malgrandan, senkulpe mortigitan birdeton, por min turmenti des pli dolore. Dum la silentaj noktoj mi aŭdas, kiel la birdeto mallaŭte bekas la fenestron kaj mi vekigigas. Kaj dum la momentoj de timo kaj malespero, kiam forta doloro enigis la ungojn en mian koron kaj minacas jen-jen rompi mian volforton, ŝajnas al mi, ke mi mem estas tiu malgranda, senpova, malsata birdeto. Mi sentas, ke ia obstina, furioza kaj malprudenta potenco tenas min en la manplato, montras al mi imagon de libereco kaj feliĉo, kaj en la plej proksima momento ĝi povas sen kialo kaj celo fortordi al mi la kapon.

*Tradukis Oresto KUZMA  
(represo el la gazeto „Literatura mondo“, № 10, 1925).*

## HISTORIO DE SOLA ESPERANTIGITA VERKO DE MIĤAJLO HRUŠEVSKIJ



A handwritten signature in dark ink, appearing to read 'Mihajlo Hruševskij', written in a cursive style.

Oni scias, ke en la jaro 1904 Miĥajlo Hruševskij kontraŭ propraj monrimedoj fondis en Kolomeo privatan instruistan seminarion. La kolomeanoj siavice diversmaniere omaĝis kaj omaĝas nun la eminentan ukrainon. Unu el tiuj ankoraŭ dumvivaj omaĝoj estas esperantigo de lia verko “Resumo de ukraina historio”. Sed pri ĉio tio laŭvice.

En la jaro 1912 en Parizo laŭ la iniciato de litova naciisto Juozas Gabrys [juozas gabris] (1880-1951) estis fondita organizaĵo Unio de Nacioj (fr. Union des Nationalités), kiu celis kontribui al la nacia memdecido de popoloj de Centra kaj Orienta Eŭropo, kiuj eniris Aŭstrio-Hungarion kaj Rusian imperion, unuavice – litovojn kaj ukrainojn. Estas interese, ke reprezentantoj de la pola nacia movado ne eniris la Union pro nekompatibleco de ilia ideologio al la ideo de la litova ŝtateco. Tiu Unio en Francio ricevis apogon de la maldekstraj centristoj. Poste la Unio eĉ aranĝis kvin Kongresojn de Nacioj (en jaroj 1912, 1915, 1916, 1918, 1919).

Unio de Nacioj ankaŭ eldonadis gazeton “Les Annales des Nationalités” [anal de naskonalite] (“Analoj de nacioj”). La redaktoro de la gazeto estis ĵurnalisto Jean Pélissier [jan pelisje] (1883-1939), kiu en la jaroj 1917-1918 estis franca emisaro-observanto en Ukrainio. Numero 3-4, 1913 de tiu gazeto estis plene dediĉita al ukrainaj aferoj. En redaktado kaj preparado al aperigo de tiu ĉi gazeto active partoprenis prezidanto de Rondeto de Ukrainoj en Parizo (fr. Cercle des Oukrainiens à Paris) Jaroslav Fedorĉuk (1878-1916).

Kaptante la okazon, mi volas kelkvorte rakonti pri Jaroslav Fedorĉuk. Li estis ukraina esperantisto, preskaŭ forgesita nun. Jaroslav Fedorĉuk naskiĝis la 18-an de novembro 1878 en la urbeto Snjatin (nun Ivano-Frankivska provinco, Ukrainio) en la familio de instruisto. Li studis en ukraina akademia gimnazio en Lvivo. En jaroj 1896 – 1902 li laboris en Lviva asekura-kredita kompanio “Dnister” laŭ strato Ruska, kie laboris ankaŭ verkisto M. Jackiv. Ekde la jaro 1902 J. Fedorĉuk loĝis en Ĝenevo (Svisio) kaj estis konata kiel adepto de M. Drahomanov. En la jaro 1906 li transloĝiĝis Parizon. Ĉi tie li finis altlernejon pri ĵurnalistiko, edziĝis, atingis dignan socian pozicion, ekposedis bienon. Ekde la jaro 1907 Jaroslav Fedorĉuk kunlaboris kun socialista gazeto “Le Courrier Europeen” [le kurjer jurepejen] kaj metis en ĝin diversajn artikolojn pri ukrainaj aferoj. Unu el la redakciano de tiu gazeto estis granda amiko de ukrainoj, norvega verkisto Bjernštjerne Bjernson (1832-1910), nobelpremiito en la jaro 1903. J. Fedorĉuk estis konato de multaj famaj kulturagantoj. En la jaro 1908 en Parizo oni fondis supremenciantan Rondeton de Ukrainoj. Dum ĝia ekzistado (1908-1914) Jaroslav Fedorĉuk estis ties sekretario kaj prezidanto. En la jaro 1910 la Rondeto nombris 120 membrojn, organizis

horon, aranĝis kursojn de ukraina lingvo, eldonis informilojn pri Ukrainio. Agintoj de tiu Rondeto estis, krom Ja. Fedorĉuk, ankaŭ Volodimir Vinniĉenko, M. Paraŝĉuk, O. Kovalenko, Je. Baĉinskij, M. Rudnickij kaj aliaj. Jaroslav Fedorĉuk, krom diversaj franclingvaj (en 1912 ankaŭ anglalingva) kontribuajoj porukrainaj, aktive agis ankaŭ esperante sub diversaj pseŭdonimoj en la franca “La Revuo” en la jaroj 1911-1914. Kiam komenciĝis la mondmilito, Jaroslav Fedorĉuk denove transloĝiĝis Svision en la urbon Laŭzano, kaj tie la 7-an de majo 1916 li mortis estinte nur 37-jaraĝa.

Sed ni revenu al nia historio. La supremenciita kajero de la gazeto “Analoj de nacioj” komenciĝis per la artikolo de eminenta korifeo de pozitivismo en historio Charles Seignobos [ŝarl senjobos] (1854-1942) “Unu malliberigita nacio” pri historia sorto de ukraina popolo. En la sama numero ankaŭ estis publikigitaj artikoloj ankaŭ de ukrainoj Serhij Jefremov, Mikola Voronij, Olha Kosaĉ, Longin Cehelskij k.a. Estis ankaŭ kelkaj artikoloj de Miĥajlo Hruŝevskij. Unu el ili estis la artikolo “Resumo de la ukraina historio”.

Dume, kiam komenciĝis la Unua mondmilito, en Lvivo, la 4-an de aŭgusto 1914, estis fondita Unuiĝo por Liberigo de Ukrainio (ULU) (ukr. “Союз Визволення України”, bonvolu ne miksi kun “Спілка Визволення України” – V.J.). Ĝiaj membroj estis plejparte politikaj elmigrintoj-ukrainoj el Rusia imperio. Fine de la sama monato ULU translokiĝis Vienon. ULU, kiel reprezentanto de ĉedniproj ukrainoj, aktive kunlaboris kun reprezentantoj de galiciaj ukrainoj – Ĉefa Ukraina Konsilio (poste – Ĝenerala Ukraina Konsilio), kiu situis ankaŭ en Vieno. La ĉefan celon de sia agado ULU opiniis kreon de la sendependa kaj unuiĝita Ukrainio. Por ĉi tio la Unuiĝo lanĉis grandskalan informadon-eldonadon.

Tial Unuiĝo por Liberigo de Ukrainio kaptis la menciitan artikolon de Miĥajlo Hruŝevskij, uzinte ĝin kiel firman porukrainan agitaĵon. En la jaro 1914 ULU eldonis ĉi verkon en Vieno germane (Prof. M. Hruschewskij “Ein Überblick der Geschichte der Ukraine”. Wien: Verlag d. Bundes zur Befreiung d. Ukraine, 1914.), kaj en Sofio bulgare (M. Хрушевски “Пръгледъ на украинската история”. София: Союз за освобождане на Украйна, 1914.). Jen kiel historiisto I. Manasijeva priskribas la bulgaran eldonon: “Informo pri strebo de ukrainaj naciaj fortoj disigi Ukrainion de Ruslando ne estis novaĵo por Bulgario. Ankoraŭ septembre 1914 membroj de Unuiĝo por Liberigo de Ukrainio (ULU) M. Melenevskij, L. Cehelskij kaj S. Baran alvenas Turkion kaj Bulgarion por starigi rilatojn inter la Unuiĝo kaj la registaroj de tiuj regnoj. En Bulgario L. Cehelskij kaj S. Baran mendas serion de ĵurnalaj artikoloj kun malkaŝa kontraŭrusia karaktero; krome, ULU eldonas du broŝurojn dediĉitajn al ukraina demando. Komence oni aperigas “Resumon de la ukraina historio” de Miĥajlo Hruŝevskij, ĝian publikigon bulgare oni motivas per “tiu intereso al Ukrainio.., kiu lastatempe, dank’ al signifo, kiu poiome gravigas ukrainan demandon lige kun lastaj eventoj, sukcesis tre grandiĝi”. La broŝuro estas kopio de la artikolo de M. Hruŝevskij, kiu aperis en la jaro 1913 en Parizo en la gazeto “Annales des Nationalités” ”.

Oni scias, ke Orest Kuzma en la jaroj 1914-1918 loĝis en Vieno. Ĉi tie li kontaktis kun Unuiĝo por Liberigo de Ukrainio, propagandis ties multnombrajn eldonaĵojn. Evidente, ĝuste dank’ al la eldonaĵo de ULU (certaj signoj indikas, ke tio estis germanlingva eldono), Orest Kuzma konatiĝis kun tiu verko de M. Hruŝevskij. Li tuj komencis es-

## jubileoj

perantigi ĝin kaj propagandi ĝin dum diversaj kunvenoj de esperantistoj. Ekzemple, en la viena ĵurnalo “Deutsches Volksblatt” [dojĉes folksblat] (“Germana popola ĵurnalo”) de la 26-a de oktobro 1915 Aŭstria katolika Ligo Esperantista anoncas pri horaro de siaj kunvenoj kaj aldonas: “Precipe interesa estis vespero la 18-an de ĉi-monato, kiun partoprenis reprezentantoj de kvin aŭstriaĵaj popoloj, kaj Orest Kuzma, la redaktoro de la gazeto “Ukraina Stelo”, laŭtlegis esperantigitan fragmenton de “Historio de Ukrainio” de profesoro de Lviva universitato Miĥajlo Hruŝevskij”. Evidente, ĉi tie temas pri la “Resumo de la ukraina historio”.

Orest Kuzma planis ankaŭ eldoni ĉi verkon, kiel apartan broŝuron, pri tio ni legas anoncon en eldonaĵo de redakcio de “Ukraina Stelo” kun tre interesa titolo “Vi-ena kalendaro de ukrainaj militaj elmigrintoj por superjaro 1916” (ukr. “Віденський Календар українських воєнних емігрантів на переступний рік 1916”), kie estas skribite: “Baldaŭ aperos jenaj broŝuroj: M. Hruŝevskij: Resumo de l’ Ukraina historio. (Перегляд історії України). Kun mapo de Ukrainio. Prezas 20 centojn”. Ĉi-kune oni anoncis la abonon. Sed plej verŝajne, ke ĉiuj anoncitaj en Vieno broŝuroj ne estis eldonitaj.

Nur reveninte en Kolomeon kaj renoviginte en la jaro 1922 eldonadon de la gazeto “Ukraina Stelo”, Orest Kuzma publikigas ĉi verkon de M. Hruŝevskij en sia propra traduko en la numeroj 2, 3-4 de la gazeto “Ukraina Stelo” en la jaro 1922. Tiun ĉi publikaĵon antaŭas antaŭparolo de la tradukinto: “En la plej kruelaj tempoj de ĝisnuna historio ni eldonas ĉi-tiun ankoraŭ en j. 1913. do sen la milita tendenco verkitan artikolon, kaj en la nomo de egaleco de ĉiuj popoloj kaj tiu de civilizacio, ni turnas nin al la tutmonda samideanaro kun peto subteni nian aferon per artikoloj en sia nacia gazetaro.

Esperante, ke tia historia resumo de nia ĝis nun bedaŭrinde tiel malmulte konata kaj nune, per unu fojon, sur la kampo de l’ internacia politiko aperinta lando, klarigos al la tutmonda legantaro aspirojn kaj celojn de nia 40.000.000 popolo kiu nune tiel laŭte kaj energie defendas sian rajton de sendependa ekzisto ni eldonas tiun, malgraŭ sia malgrandeco tre orienteblan trarigardon.

Ĝi estas tradukaĵo de artikolo de eminenta ukraina instruitulo, ŝatata profesoro universitata en Lvovo, Myĥajlo Hruŝevskij, verkita en 1913. j. por la revuo “Annales des Nationalités” N-o 3. kaj 4. en Parizo.

La traduko aperas sen permeso de la aŭtoro, ĉar pro milito, la interkonsento estis tute ne ebla. Sed mi esperas, ke la estimata aŭtoro pardonos tiun nian nur pro patriotaj motivoj kaj por bono de nia nacio, senpermesan publikigon de lia laboro”.

En la sama jaro 1922 esperantigita verko de Miĥajlo Hruŝevskij “Resumo de la ukraina historio” kun etnografia mapo estis eldonita en la formo de aparta broŝuro ampleksa je 20 paĝoj kaj kun la prezo 200 markoj, kiel la unua numero de la biblioteko de “Ukraina Stelo” per kolomea-stanislaviva eldonejo “Bisticja”.

**P.S.** Aŭtoro de ĉi tiuj linioj ne scias pri iuj aliaj verkoj de Miĥajlo Hruŝevskij kiuj estis esperantigitaj, ne konsiderante malgrandan citaĵon el lia (M. Hruŝevskij) “Historio de Ukrainio-Rusjo” en la gazeto “Litova Stelo” en la jaro 1995.

Viktor JASKOVEC, Ivano-Frankivsk



## NEFORGESEBLAJ IMPRESOJ PRI HISPANAJ ESPERANTISTOJ



Dum pli ol unu monato (ekde 23-an de aprilo ĝis la 26 de majo) mi gastis ĉe mia filino, kiu loĝas en Zaragoza (pr. Saragoŝa). Zaragoza estas ĉefurbo de la aŭtonoma provinco Aragono (nordo de Hispanio). Ĝi estas antikva urbo, fondita de la romia imperiestro Aŭgusto.

Zaragoza situas sur la bordoj de la rivero Ebro kaj famas pri sia pilgrimloko – baziliko de la Virgulino de la Pilar. La urbo havas pli ol 700 000 loĝantojn.

Min kiel esperantiston interesis, kompreneble, antaŭ ĉio E-aktivado en la urbo, ja pri ĝi mi multon sciis de mia amiko Enrique Navarro kaj el aliaj fontoj. Kun Enrique mi konatiĝis en Moskvo en 1983 apud la hotelo „Sebastopolo“. Mi estis partoprenonta la Universalan Kong-



reson en Budapeŝto kaj estis venigita kun aliaj sovetaj UK-partoprenontoj la ĉefurbon „por instrukcioj“ (tia ordo ekzistis tiam). Irante al la hotelo mi rimarkis samaĝan kiel mi viron

kun la verda steleto surbruste. Mi alparolis lin esperante, ni konatiĝis, kaj de tiam ni restis bonaj amikoj. Enrique sisteme konigis al mi E-movadon en Hispanio kaj Zaragoza, sendis multajn librojn, vortarojn, plurfoje invitis min viziti Hispanion.

Kaj jen mi post tre laciga preskaŭ 3-taga vojaĝo per buso venis Zaragozon. En la plej proksima mardo mi renkontis Enrique kaj vespere ni iris al la E-klubejo, kiu situas en la centra parto de la urbo. Dum antaŭaj tagoj Enrique sukcesis informi la klubanojn „pri alveno de fama ukraina esperantisto“ al Zaragozo. Pro tio venis 13 personoj. Min salutis la prezidanto de la societo „Frateco“ Lorenzo Noguero. Inter la venintoj

## vizito

mi rekonis ankoraŭ du konatinojn – Antonia-n kaj Maria-n-Fernanda-n, kun kiuj mi konatiĝis dum UK en Varsovio en 1987. Mi faris mallongan prelegon pri nia lando, pri rusia agresio, pri E-movado en Ukrainio. Poste ni trinkis po glaseto da bona vino, postmanĝante ĝin per bongustaj bombonoj kaj biskvitoj.

Kun granda intereso mi ĉirkaŭrigardis la klubejon, kiu havas areon ĉ. 60 m<sup>2</sup>. Ĝi situas en la unua etaĝo kaj estas la propraĵo de la societo. La restadejo konsistas el kelkaj ĉambroj: salono, instruĉambro, kabineto de la prezidanto, kuirejo. La klubo fieras pri sia trezoro – riĉa E-biblioteko, kiu nombras 3000 librojn kaj gazetajn jarkolektojn. En la instruĉambro mi renkontis Pablón Conesa, kiu instruis du novajn membrojn (por la nuna kurso aliĝis 5 personoj). La kurso, kiel ĉiuj antaŭaj, estas senpaga kaj okazas unufoje en la semajno – marde.

Mian atenton altiris alta junulo kun originala frizaĵo. Li estis usonano Denver Garisson devenanta el la ŝtato Oregona. En Zaragozo li laboras: instruas la anglan. Lia E-lingvaĵo estas tre bona. Sed plej interesa por mi evidentiĝis Antonio Marco Botella. Malgraŭ sia profunda aĝo (95!) li aktive laboras por Esperanto. S-ro Botella aŭtoras 24 librojn kaj nun laboras super la 25-a. Lia lasta libro – ĉirkaŭ 300-paĝa „Hispana lirika antologio“ – estas en mia biblioteko, pro tio mi havis eblecon anticipe taksii la valoron de ĉi volumo. Cetere, la libro, kiel pluraj aliaj estis eldonita de „Frateco“. Ĉi-vespere mi eksciis multajn aliajn interesajn faktojn pri la societo. Zaragoza 5-foje gastigis tutlandajn hispanajn kongresojn (en 1921, 1954, 1967, 1983, 2013). Lastatempe la tutlandaj kongresoj pasas sub certa temo, ekzemple la lasta zaragoza havis la temon „Lingvo kaj sento“. Poste mi multe meditis super tiu faktoj. Ja ankaŭ UkrEA planas okazigi siajn kongresojn ĉiu-jare en alia urbo. Bonega ideo! Sed ukreanoj devas ankaŭ deiri de la tradicia kongresa tagordo: raporto de la prezidanto – diskutado – labortakso, reelektado de gvidorganoj. Rezulte – 2-taga enuo kaj enuigo. Anstataŭ tio ni devas dediĉi nian atenton al interesaj prelegoj, konkursoj, ekskursoj...

Ĉiu fratecano sendepende de lia socia stato pagas jarkotizon 35 eŭrojn. (Kiel ridinde aspektas niaj kotizoj kun ia transkalkulo je „steloj“ kaj senĉesaj fidiskutoj pri ĝiaj ampleksoj kaj celoj!).

Poste mi vizitis la klubejon ankoraŭ dufoje. Mi prelegis pri la ukrainaj tradicioj kaj moroj, planis prelegi ankaŭ pri la permalsatiga mortigo, sed tiu plano ne tute realiĝis: mi rakontis pri tio tre mallonge. Ĉar kiam mi venis la klubejon triafoje, tie jam estis nova gasto, maljuna viro. Evidentiĝis, ke tiu estas nepo de la fondinto de „Frateco“ Emilio Gastón Ugarte (1877-1925). Li alportis al la societo gravajn dokumentojn – atestojn de Ugarte pri lia membreco en „Frateco“, UEA, malnovajn jarkolektojn de la gazeto „Esperanto“. Jam post kelkaj tagoj ĉio ĉi estis enretigita kaj estis disponebla ne nur por la fratecanoj, sed ankaŭ por ĉiu interesiĝintoj (ligilo: <https://sites.google.com/site/fratecoesperanto/biografioj/emilio-gaston>). Jen ankoraŭ unu bona ekzemplo por niaj esperantistoj!

La tria vizito al la klubejo finiĝis per biertrinkado en apuda baro, al kiu invitis min la sekretario de la societo kaj kelkaj klubanoj. Hispana biero estis bongusta. Mi bedaŭris, ke post kelkaj tagoj mi veturos hejmen kaj ne plu vidos tiun ĉarmajn, bonkorajn homojn, bonkorajn homojn kun iliaj sinceraj ridetoj. Mi sentis min ilia kunfrato. Adiaŭ, miaj novaj kaj malnovaj geamikoj! Venu al nia lando, al mia domo! Ĉiu el vi estos mia plej kara gasto!

Aleksandro Logvin

**RIVERETO**

Jes, nur hieraŭ  
 tie ĉi susuris  
 rivera akvo  
 pura, kiu kuris  
 libere, gaje  
 en la sama loko  
 jarcentojn  
 el epoko al epoko...  
 Hodiaŭ ĝi,  
 barita per la digo –  
 embarasita  
 muĝas pro devigo –  
 sen plua kuro,  
 sen babli' ĉiama.  
 Ho, ĉu ne batas nin  
 la fato sama?!  
 Alvenis urbo,  
 bruo trapasanta  
 per gruo, per buldozo  
 frakasanta...  
 Suprenleviĝis mastoj,  
 ferfadenoj,  
 sed malaperis najtingal',  
 ĝardenoj...  
 La riveret' –  
 en ferbetona tubo –  
 por ĉiam restas  
 sen ĉiel', sen nuboo...  
 Pejzaĝo nova –  
 urba, magazena,  
 tre plata, glata,  
 rekta, polvoplana,  
 kun knaro  
 kaj kun grincio de ŝoseo  
 kaj kun postaŭta  
 fajfa ventoveo.  
 Ĉi tiu ve'  
 reĉhas kun angoro  
 en mia brust',  
 en konsolinda koro.  
 Kaj kvankam ŝajne  
 estas trivialo,  
 sed plendas mi  
 pri eta najtingalo.

Олександр Логвин

**РІЧЕЧКА**

Ще вчора чиста  
 тут вода дзюрчала  
 і річка в далечинь  
 нестримно мчала  
 на волі,  
 не сумуючи нітрохи,  
 віками  
 від епохи до епохи...  
 Вона загатою  
 сьгодні скута,  
 і лише стогін  
 підневільний чути,  
 завмерла течія  
 в німому болі.  
 Чи не така і нас  
 чекає доля?!  
 Тепер тут місто,  
 гуркіт неустанный,  
 важкі бульдозери,  
 високі крани...  
 Столпи залізні  
 небо підпирають,  
 та солов'я і саду  
 вже немає...  
 А річечці труба  
 здушила груди –  
 і неба, і хмарини  
 вже не буде...  
 Пейзаж новий –  
 міський і магазинний,  
 заплений, прямий,  
 плаский, рутинний.  
 Гурчать автівки  
 трасами курними,  
 і вітер стогне  
 навздогін за ними.  
 Цей стогін сумом  
 у душі озветься,  
 дістанеться  
 до зболеного серця.  
 І хоч я не здивую  
 цим нікого,  
 та соловейка  
 жаль мені мало.



Aleksandr Logvin  
 (naskiĝis en 1903 en  
 Ukrainio, mortis en  
 1980 en Moskvo). Li  
 estis laboristo, fervoja  
 konduktoro, relŝaĝisto,  
 kontoristo, metaltornis-  
 to, ĵurnalisto.

Li esperantistiĝis en  
 1923, kaj aperigadis  
 poemojn en "Heroldo  
 de Esperanto" sub la  
 plumnomo Aleksandro  
 Liljer dum la tridekaj  
 jaroj. Li kunlaboris en  
 esperantlingvaj gazetoj  
 kaj revuoj. Li poste  
 perdis kontakton kun  
 la Movado, sed reeniris  
 ĝin en 1959, kaj en  
 1964 aperis lia poemaro  
 "Sur la vivovojo" ĉe  
 "Stafeto". Liaj poemoj  
 lastatempe aperis en  
 "Paco" kaj "Der Espe-  
 rantist".

Tradukis Petro Palivoda  
 Переклад з есперанто  
 Петра Паливоди

## moderna ukraina beletro

Ĥristina Kozlovska, prozistino, poetino. Ŝi naskiĝis en la vilaĝo Velika Kamjanka de Kolomea distrikto de Ivano-Frankivska provinco, studis anglan filologion en Ĉekarpata Nacia Universitato „Vasil Stefanik“. Ekde 2008 ŝi estas membro de la literatura studio „Nobel“ gvidata de Halina Petrosanjak. La aŭtorino partoprenis en la kolekto de verkoj de “Nobel”-anoj ( “Donu! Nobel-premion al ukrainaj verkistoj!”). Ŝiaj verkoj aperis en “Svit molodi”, “Bukovinskij ĵurnal”, “Pereval”. Gajninto de la literatura premio de la eldonejo “Smoloskip” en 2014 kaj gajninto de la internacia ukraina-germana literatura premio “Oles Honĉar” por la manuskripto, publikigita kiel aparta libro “Pli valora ol oro” en la literatura agentejo “Discursus”.



**Ĥristina Kozlovska**

**FLORO**

\*\*\*

Kaj ĉio komenciĝis tute ne banale, ne tiel, kiel ĉe la plimulto de homoj. Ne pro la deziro donaci neprofiteme al iu amon kaj zorgadon kaj same akcepti ilian amon kaj zorgadon. Ĉar delonge venis al ŝi kompreno, ke sen ŝia amo ne nur la mondo, sed ankaŭ koro de eĉ unu persono ne haltos. Ĝis nun ŝi ne havis okazon renkonti homojn, kiuj postulus de ŝi tiun amon. Kaj interna nekomprenebla, probable denaska asketismo ne permesis vidi bezonon je aĵoj aŭ sentoj, kiujn ŝi ĝis nun tute ne bezonis. Sekve temis pri io alia, multe pli pragmata. Temis pri helpo, antaŭ ĉio al ŝi, kaj poste ankaŭ pri oportuna kunekzistado. Sed komence estis artikolo en loka gazeto.

Kiel katinoj kuracas homojn

... ili povas ĝuste determini malsanan lokon de homo kaj sanigi ĝin ... kuŝiĝas sur malsanan korpoparton, varmigas kaj masaĝas ĝin ... kreas specialan energian fonon ... senigas je depresio, sendormeco, hipertensio, artrito kaj eĉ infarkto, ... kuracas ginekologiajn malsanojn kaj problemojn de la spirsistemo ... kontribuas al pli rapida cikatriĝo de vundoj, forigas kapdolorojn ...



Ŝi simple fiksigardis la artikolon legante la liniojn kun la listo de malsanoj, kiujn tiel facile povas kuraci simpla kato, kaj nur flugrigardis tiujn liniojn, kie temis pri la amo, kiun tiuj animaloj donacas al siaj mastroj, kaj pri tio, ke tiu kuracado okazas plej probable sur la psikologia nivelo, kaj ke tiu longa kaj klopoda procezo dependas ankaŭ de la mastro, kiu devas agordi kontakton kun animalo, se eblas tiel diri, fidi ĝin. Tiuj lokoj en la teksto pri amo ŝi perceptis kiel ĝeneralan fonon de ceteraj gravaj faktoj. Ŝajnis, ke “amon” homoj enŝovas ien ajn por fuŝmiksi la tekston ŝtopitan per datoj kaj eventoj, eble, ke ĝi ne ŝajnu tro malfacila por legado kaj posta asimilado (digestado?). Iom simile al tio, kiel oni trinkas akvon post solida nutraĵo por ne glutsufokiĝi. Kompreneble, akvo estas vivonecesa, oni ĝin ĉiam bezonos, tamen ĝi ja estas tia... tia seneca, sen odoro kaj sen gusto. Amo por Nina estis akvo. Amo estas io sen odoro kaj gusto. En sia vivo ŝi neniam rimarkis ĝin. Sed eble amo falis sur ŝin kiel pluvo per etaj porcioj? Sed tiam amo estis ensorbata per ŝia korpo, kaj Nina denove nenie rimarkis ĝin. Tamen Nina jam kutimiĝis, ke homoj ofte agas tiamaniere rilate al amo, provas profiti de ĝi. Tial ĉion gravan por si en la artikolo ŝi ekvidis, kaj la negravan ekvidis kaj forgesis.

## moderna ukraina beletro

Jam sekvatage Nina iris hejmen ne sola. Enkorbe kuŝis silentiĝinta timigita katinino. Plenkreska individuo, neniukaze katido. Nina ne havis eĉ plej etan deziron klopodi ĉirkaŭ la katido, manĝigante ĝin el boteleto, lerni ekskrementi en la sablon kaj, Dio gardu, ludi kun ĝi aŭ ĝenerale dediĉi al ĝi pli da atento ol necesas por kvietaj kaj paca loĝado sur komuna teritorio. Do ŝi trovis tion, kion volis – jam ne junan katinon, kiun ne plu favoris ŝia mastrino, amikino de Nina, aŭ, pli ĝuste, koleginino. La katinino jam delonge ĉesis esti freneza amuza kreitaĵo, kiu tutajn tagojn kuradis tien kaj reen tra la loĝejo, gratis tapetojn, pendis sur kurtenoj, amuzante per tio domloĝantojn, anstataŭe ĝi estis trankvila, indifera, iomete pigra kaj, kiel ŝajnis al ĉiuj, maljuna.

Survoje Nina vizitis vendejon kaj aĉetis senelekte iun katan nutraĵon, pretiĝante por plej malbonaj situacioj. La virino jam imagis al si terurajn bildojn de nekredebla sopiro de la animalo al ŝia ĝisnuna hejmo, al ŝi ŝajnis, ke ŝi jam aŭdas akran senesperan katan hurladon kaj eĉ supozis, ke finfine ŝi devos redoni la katinon.

Sed la vivo komencis donaci al Nina siajn misterojn. Komence donaci kaj poste jam malkovri ilin. Kaj la unua mistero iĝis Floro. Tiel nomiĝis la katinino, kiun Nina ĝuste nun estis portanta en ŝia korbo en la loĝejon. Tiel ĝi nomiĝis denaske, kaj en la kapon de Nina neniam venus la penso nomi la katinon alie. Unue, Nina estis nekreema homo. Ŝia nekreemo atingis tiajn altaĵojn, ke simple elpensi nomon por la katinino kaŭzis neimageblajn mensajn suferojn. Kompreneble, al ŝi venis la penso pri io simila al Ronrona, kaj Ronrona ĉiam kaj ĉie asociiĝis kun infanverseto pri Katinino Ronrona (kie vi estis...) kaj pro tio ŝiaj suferoj eĉ pli intensiĝis. La virino ne ŝatis rememori sian infanecon.

Nina elkorbis la katinon kaj mem sidiĝis en malgranda kuirĉambreto. Ŝi rigardis vake, frotante sian dekstran genuon, kiu ankoraŭ survoje ekbrulis. Kaj ferminte la okulojn ŝi falis tra kelkaj etaĵoj en varman sukan someron, kiu estis plena de varmaj sukaj pomoj en la ĝardeno de ŝia avo. Jen estas pomarboj de la avo, kaj jen la najbaraj, kaj kiu dubus, ke sur la najbaraj pomarboj pomoj estas pli bongustaj. Jen estas la barilo inter la ĝardenoj, kaj jen super la barilo estas ŝi, ruĝa longkrura bubino - staras sur la maldika branĉo, tenas sin per ankoraŭ pli maldika maneto je alia branĉo, kaj per la dua tiras sin al tiuj pli bongustaj pomoj. Kaj tiam okazis tio, kio devas okazi en ĉiu paradizo, eĉ pli, se temas pri pomoj. Poste estis dolore kaj estis larmoj. Kaj la najbaraĵ knaboj ridegis ankoraŭ daŭre, vidinte ŝian sportpantalanon, kiu minacis malkudriĝi, tirite sur gipsobandaĝon sur la dekstra kruro. Kaj ĝuste la dekstra kruro, kaj pli ĝuste la dekstra genuo, reaganta al ĉiuj veterŝanĝoj, estis destinita al Floro, al ĝiaj nekredeblaj kurackvalitoj.

Sed tempo pasis, genudoloro ne ĉesis, kaj la katinino plu sidis sur ŝia loko kaj ŝajnis jam dormeti. Nur nun Nina konsciis ridindecon de la situacio. Kiel povis ŝi, adolta virino, kredi la artikolon, kiu ŝajne estis destinita nur por okupi superfluan spacon sur la paĝo? Sed tamen Nina decidis provi alian varianton. Eble Floro sidas simple tro malproksime kaj ne sentas iujn tiajn ondojn, kiuj devus eliri de la malsana loko? Nina prenis la katinon kaj sursofiĝis ĝin apud si. Kaj poste - sur sian malsanan genuon. Floro dum kelkaj sekundoj vere ne moviĝis, sed poste trankvile stariĝis kaj kuŝiĝis, fleksinte sub si la kruojn sur la plej fora de Nina rando de la sofo.



Tiun tagon Nina sentis sin tre amare. Ŝi metis sur tiun katoterapion sian lastan esperon por resaniĝo. Nu, se ne pot resaniĝo, do almenaŭ por dolorkvietiĝo, sed ĉio montriĝis vana. Jen tiel ili sidis, ĉiu en sia angulo, du solecaj estaĵoj, indiferentaj por ĉiuj kaj indiferentaj al ĉio kaj dume indiferentaj unu al la alia.

\*\*\*

Printempo jam delonge memorigis pri si, sed ne per verdaj folioj ekster la fenestro, ne per odoro de floroj, ne per kantado de birdoj. Ne, en ŝia urbo kiel la unuaj pri la printempo komencis paroli muroj. Post kelkaj pluvegoj printempo ŝtelpenetris la vestoreparejon per grizaj malpuraj ŝimomakuloj, kaj tiu printempo odoris tute ne romantike kaj ne favoris al disvastigo de fluidoj sur reprezentantojn de la malsama sekso. Do Nina plu sidis ĉe la fenestro sole, plene profundiginte en sian laboron. Se antaŭe iu el viroj havis okazon viziti por nelonge ilian atelieron, ili turnis sian atenton al Nina ne pli ol al malriĉa meblaro. Malnova seĝo, sur kiu ili kutime sidiĝis, vekis ĉe ili pli da intereso. Sed tio tute ne koncernis Nina-n, kaj ĝenerale malmulto koncernis ŝin en tiu ĉambro. Ŝiaj oreloj foje kaptis iajn strangajn aŭ laŭtajn sonojn venantajn de la strato tra la putraj fenestroj, sed mense ŝi delonge estis hejme. Nina pense revenis hejmen tuj, kiam ŝi

## moderna ukraina belestro

venis al ŝia laborloko. Nun ŝia hejmo estis ja ne nur malgranda unuĉambra loĝejo, nun vivis en ĉi loĝejo iu, kiu atendis ŝin. Kaj tiu estis Floro.

La virino ne rimarkis, kiel ĉio okazis. Kiel okazis, ke tiu estajo eksignifis por ŝi pli ol ĝi devus. Nina rimarkis, ke ŝi ĝojas pri ĝia ĉeesto pli ol pri ĉeesto de ajna persono en sia vivo. Kaj tio tute ne timigis la virinon. Male, nun malmulto ŝin timigis. Ŝi sentis trankvilon ĉiumatene, kiam ŝi vekigis kaj vidis apud si Floron. Kaj ankoraŭ ŝi sentis trankvilon, kiam ŝi nokte ekdormis kaj aŭdis, kiel sur ŝian rufan hararon, disjetitan surkusene, kuŝigis same rufa Floro kaj verŝajne kunfandiĝis kun ĝi. Nina eĉ provis imagi, kiel amuze tio povus aspekti. Kaj ankoraŭ Nina sciis, ke apenaŭ ŝi venas de la strato en la porĉon, Floro saltas de la sofo aŭ seĝo, kuras al la enirpordo de ilia loĝejo sur la kvina etaĝo kaj jam nenien de ĝi deiras, ĝis kiam ĝi finfine renkontos ŝin, Nina.

Kaj Nina vere vidis la katinon ĉiufoje, kiam ŝi malfermis la pordon. Ŝi ĵetis siajn sakojn kaj antaŭ ĉio prenis Floron en siajn brakojn. Kaj tiel estis ĉiutage, dum multaj tagoj, multaj monatoj. Nina ne maltrankviliĝis, ke jam tiel longe ŝi estas infane alligita al la animalo, ke en sia vivo neniun plu serĉas, nek bezonas. Ŝi simple neunufoje pensis, ke homoj ne povas esti tiaj kiel animaloj - simple ami, sendepende de io.

Nun printempe la malsana genuo ĉiam pli tedis Nina-n, ĝi doloris tordate tiel kvazaŭ post lavado oni tordelpremas malsekajn vestaĵojn. Foje tiu teda doloro forprenis ĉiujn fortojn. Ŝi povis fari nenion, nur sidis kaj frotis sian genuon per diversaj unĝentoj, kiuj kvankam helpis, sed ne por longe. La tutan tempon Nina pacience atendis, ke Floro iam aliros kaj tamen kuŝiĝos sur la malsanan lokon kaj tiam ŝi ne plu devos fari tiujn sensencajn procedurojn kun medikamentoj. Sed Floro, kio estis sufiĉe strange, neniam faris tion. Iam (Nina jam ne memoris kiam kaj kie) ŝi aŭdis, ke katoj sentas, kiam al homo estas vere malbone, kaj nur tiam helpas. Nina pensis, ke jen nun estas tiu momento, ĝuste nun al ŝi estas tre dolore kaj ĝuste nun ŝi kiel neniam bezonas helpon. Sed helpo ne venis de ie, do al Nina nenio plu restis ol simple plu atendi. Kaj ŝi atendis.

– Nina, vi ja estas strangulino - diris Maria, kolegino de Nina, kiun ial incitis tia, laŭ ŝia opinio, malsaneca alligiteco al la animalo. – Vi devas krei familion, ekhavi infanojn. Finfine, vi bezonas homon, sed ne katinon.

– Sed mi ofte ne komprenas homojn - naive respondis Nina. – Sed katinoj... ili estas multe pli simplaj, ili...

– Sed vi estas ja homo, Nina, vi estas virino, kaj por virino estas eĉ pli grave, nekredeble grave ne esti sola. Ĉar esti sola dum maljuneco estas neelteneble, kaj maljuneco ne estas tiel malproksima.

– Sed mi ja ne estas sola, Maria, kaj maljuneco, mi opinias, ne estas tiel timinda.

Maria ne sciis, kion ŝi povas respondi al Nina al ŝiaj lastaj vortoj, do lasinte ŝin agi laŭ sia bontrovo, ŝi reekokupis sin pri sia laboro.

Kaj Nina vere ne tre timis maljunecon, kaj eble tute ne timis. Ja kial homoj timas maljunecon? Antaŭ ĉio ili timas ŝanĝojn. Ili timas, ke post ĝia alveno io ŝanĝos definitive. Sed la vivo de Nina estis ĉiam egalritma kaj monotona, ĝi fluadis per



homogena maso tra ŝia viva, tute rekta (ne kurba, kiel estas kutime dirate en paroladoj dum studfinaj festoj) vojo, kolorigante ĉion ĉiam neŭtralkolore. Ŝiaj infanaĝaj ambicioj ne tro diferencis de la ambicioj de juneco, kaj tiuj siavice - de la ambicioj de matura virino. Kaj samtempe ŝi ne estis infaneca, naiva aŭ sensprita. Simple ekde infanaĝo ŝi al kutimiĝis ne nutri sin per ĥimeraj iluzioj, ne kombini fantaziajn planojn, ne aspiri al io tre forte. Nina scipovis esti simpla en ĉio. Ŝi estis simpla en rilatoj kun homoj, en rilatoj kun la vivo. Ŝi neniam postulis de ĝi ion pli grandan ol ĝi estis donanta al ŝi en ĉimomente kaj samtempe volis, ke ankaŭ vivo rilatu al ŝi same.

Nina ne ŝatis elprovi sorton, ŝi ne ŝatis eĉ aŭskulti pri fremdaj elprovoj. Iufoje ŝi pensis, ke eble tiuj homoj estas mem kulpaj pri siaj problemoj, ĉar kiam vi petas vivon pri io pli granda, tiam ĝi povas postuli de vi la samon. Do la infanaĝo de Nina transfluigis tiel glate, tiel nerimarkeble en la junecon, ke ŝi ŝajnis esti ĉiam fraŭlino kaj neniam knabino. Kaj poste same alvenis matureco, kaj nun ŝi ŝajnis esti ĉiam virino kaj neniam fraŭlino. Kaj la samon ŝi atendis de maljuneco. Dirante pli ĝuste, Nina sciis, ke nenio ŝanĝiĝos, ŝi estos la sama, kaj ĉio ĉirkaŭe restos la sama, almenaŭ sur ŝia teritorio, en ŝia loĝejo. Nina scipovis ĝoji pri la hodiaŭa tago, ŝi ĝojis pri florantaj arboj, varmaj matenoj, kiujn ĉiam pli ofte anstataŭigis la malvarmaj, bongusta manĝaĵo, bonaj filmoj, sed pleje Nina ĝojis pri ĉesto de Floro. Ŝi apenaŭ povis imagi la vivon sen ĝia lanuga varma korpeto sur ŝiaj brakoj. Kaj, kio estis plej grava – Nina mem sentis, kiel Floro bezonas ŝin, kiom grava ŝi estas por ĝi.

\*\*\*

Li estis sufiĉe alloga, kvankam jam delonge ne juna viro. Malrapidaj, iom pigraj movoj, facileta frapetado per fingroj sur la tablo, tutnova, gladita kostumo – ĉio atestis, ke li ne kutimis tumulto, sed kutimis, ke ĉiuj tumultas ĉirkaŭ li kaj komplezas lin. Kaj li mem ŝajne ŝatis komplezi sin. Li sidis en pensiginte kaj krucinte la kruojn. Nina plurfoje timeme rigardis la viron de sia sidloko. Poste ŝi ne povos rememori, por kio li venis al ilia vestoriparejo, eble por refaldi pantalonon, aŭ eble ne. Sed ĉi tio ne gravis, estis nur grava, ke li tamen estis tie, kaj simple atendi sur sia seĝo ne sufiĉis por li, do li decidis ekparoli. Kaj li ekparolis al Nina.

– Bona vetero estas hodiaŭ, ĝi, laŭ mi, estas la unua vere varma tago printempe.

Komence Nina ne intencis respondi, ĉar simple ne komprenis, ke tiuj vortoj estis adresitaj al ŝi. Sed post kelkaj sekundoj de profunda silento ŝi tamen levis siajn okulojn de kudrado kaj ĉirkaŭrigardis la ĉambron. Kial neniu respondas al li? – pensis la virino, serĉante per la okuloj siajn kolegininojn. Ŝi tre esperis ekvidi tie almenaŭ iun alian krom ŝi mem kaj tiu sinjoro, kiu ial rigardis ŝin. Kaj kiam Nina rimarkis, ke ili estas en la kudrejo solaj, ŝin kaptis ia stranga ekscitiĝo. Ŝi sentis, kiel sango ĵetiĝis en ŝian vizaĝon kaj manoj ekŝvitis. Ŝi tiom profundiĝis en siajn pensojn, ke simple ne rimarkis, ke du kudristinoj, kiuj hodiaŭ laboris kun ŝi, ien eliris. Ŝi tre deziris nun, ke ili revenu baldaŭ. Sed tiujn du, bedaŭrinde, kvazaŭ la tero englutis. Kaj kvankam la viro sidis ne apud ŝi,

## moderna ukraina beletro

sed ĉe la najbara tablo, tamen Nina sentis odoron de lia parfumo kaj maltrankviliĝis pro tio eĉ pli. Ŝi simple ne havis alian eliron.

Ŝi rigardis lin, ne havante eĉ plej etan ideon, kion ŝi povus respondi al li. Jes, la vetero estas bona, la tago estas vere varma, do kio? Nina neniam komprenis, kiel oni povas paroli pri la vetero. Ŝi ne apartenis al tiuj, kiuj parolas por ne silenti. Ne, ŝi ne estis iu homevitulino, ŝi simple ŝatis paroli, kiam tio vere necesis. Sincerdire, Nina ne sciis lerte komunikiĝi kun tiaj sinjoroj en belaj kostumoj, kun tiaj flegitaj, jam grizetaj barboj. Nina ĝis nun nenion respondis. Ŝi jam ekpensis, ke ĉio eble iel pasos. Sed la sinjoro ne intencis lasi ŝin en paco.

– Vi estas bonŝanca, ke vi sidas ĉe la fenestro, el ĝi, verŝajne, malfermiĝas belega vidaĵo sur la straton.

La viro ridetis al Nina, ŝi siavice kapjesis, sentante, kiel flamas ŝiaj vangoj.

– Ĉu vi scias, sinjorino... – li rigardis demande el sub siaj vitretoj al Nina, kaj tiam ŝi jam ne konfuziĝis.

– Nina – ŝi diris per apenaŭ aŭdebla voĉo.

– Do, sinjorino Nina, ĉu vi scias, ke nome tiu strato, jen tiu, kiu estas ekster via fenestro kaj en kiu vi havas feliĉon labori, estas unu el la plej malnovaj stratoj de nia urbo? – li sidis flanke al la tablo, sin apoginte al la dorso de malnova seĝo. Lia maldekstra mano estis en la poŝo, kaj la dekstra ludis kun liniilo, kiu antaŭ tiu momento kuŝis sur la tablo.

– Mi ne sciis – ŝi kapneis, daŭrigante sian laboron.

Li ŝajnas esti iu profesoro, pensis Nina. Ŝi ne sciis certe, sed ĝuste tia devis esti en ŝia imago vera profesoro aŭ doktoro pri sciencoj, aŭ iu ajn el tiuj doktaj respektataj viroj.

– Iam ĉi tie troviĝis la unua poŝtejo, la unua teatro. Ho, se vi nur sciis, kiom grava estis tiam teatro por urbanoj! Vespere homoj kunvenis ĉi tien el ĉiuj partoj de la urbo, – lia voĉo tre sonoris en tiu granda kaj duonmalplena ĉambro. Ĝi eĥiĝis de la nudaj muroj kaj plenigis per si la tutan spacon. La viro svingis la liniilon kiel dirigento bastonon, kaj nun al Nina ŝajnis, ke tiu sinjoro tute ne estas profesoro, sed plej verŝajne aktoro, konata teatra aktoro. Kaj ju pli atente li rigardis Nina-n, des pli ofte ŝajnis al ŝi, ke io perturbas ŝin. Ŝi senĉese ordigadis sian ruĝan lanugan hararon, kiu konstante elipingliĝis, tiradis malsupren la manikojn, kiuj ĉiam sur ĉiuj vestoj estis tro mallongaj por ŝiaj longaj maldikaj brakoj.

– Kaj al vi, sinjorino Nina, kiu arto plaĉas pleje? – liaj okuloj brilis, sed eble al Nina nur ŝajnis tiel, sed fakte brilis liaj okulvitroj?

La virino respondis la veron, ne detirante siajn okulojn de la kudromaŝino:

– Mi ne scias – Nina hontis pro ŝia respondo. Antaŭe ŝi neniam ĝenus pro tiaj bagateloj, sed ial nun ŝi ŝatus diri ion pli saĝan.

– A-ha-hah, – la viro ekridis – vi pravas, sinjorino Nina, ni forgesu pri arto. Diru al mi prefere ion alian? Nu... ekzemple, kiun okupon vi ŝatas hejme, en via libertempo?

Al tiu demando Nina jam konis la respondon, sendube Floro estas ŝia ŝatokupo.

– Hejme mi prizorgas mian katinon.



– Ho, kiel ĉarme tio estas..., viro denove ridetis, al Nina eĉ ŝajnis, ke ŝi aŭdis iun maliceton en lia voĉo. – Kaj kel ĝi nomiĝas?

– Floro.

– Vi scias, iam mi faris unu esploron pri tiu temo kaj klarigis, ke virinoj de via aĝo estas la plej emaj al korinklino al animaloj.

Tio embarasis iomete Nina, ŝi eĉ opiniis, ke vane ekparolis pri tiu temo.

– Mi simple amas mian Floron, kaj ŝi amas min.

La viro lasis la liniilon kaj nun atente rigardis Nina-n.

– Mia karulino, mi bedaŭras disrevigi vin, sed mi devas fari tion. La afero konsistas en tio, ke katoj kaj animaloj ĝenerale ne scipovas ami. Ili ne estas kulpaj pri tio, simple tia estas ilia naturo.

Nina ankaŭ lasis sian laboron kaj turnis sin al la viro. Kiel li povis tiel rapide trovi ŝian la plej tiklan punkton? Nina iĝis malgajhumora, ŝin absolute indignigis liaj lastaj vortoj. Nina komencis defendi sin, ĉar la nekonato atencis ion tre valoran por ŝi.

– Kiel vi povas koni la naturon ĝuste de mia Floro? Vi ne scias, pri kio vi diras!

– Ĉio estas tre simpla, ĉiuj katinoj estas la samaj.

– Ne, ne estas la samaj. Se vi vidus, kiel ĝi renkontas min de laboro, kiel karese alpremiĝas al mi, kiam al mi estas malbone, vi ne dirus tiel. Mia Floro amas min, kiel neniu alia.

## moderna ukraina beletro

– Sinjorino Nina, mi havas akademian titolon en psikologio, do kredu min, mi scias, pri kio mi parolas. Animaloj ne povas ami, ĉe ili forestas memkonscio. Memkonscio estas termino indikanta operacion, per kiu homo perceptas sin. Dank’ al ĝi homo ne nur komprenas la eventojn, kiuj okazas kun li aŭ ŝi, kiel tion faras aliaj vivantaj estaĵoj, sed ankaŭ povas analizi ilin. Kiam homo amas, li aŭ ŝi konscias tion.

– Sed ĉu mia katinjo kondutis tiel, se ĝi ne amus min? Kiel do oni povas klarigi tion? – Nina ankoraŭ insistis, kvankam ŝia voĉo ne plu estis tiel certa.

– Animaloj posedas konojn de refleksa naturo, sed ili eĉ ne konscias tiun konon. Ili ne havas amon kiel tia, estas nur alligiteco, nur kutimo. Se sur via loko estus alia homo, via: uh... Floro, se mi ne eraras, kondukus same kun li aŭ ŝi. Ĝi same kurus al la pordo, kiun ŝi malfermus ĝin, ĉar ĝi sciis, ke ĝia mastrino nun donos al ĝi manĝaĵon. Ĝi same frotiĝus kontraŭ kruro de tiu alia, ĉar al kutimiĝis, ke post tio ĝi estas karesata. Tio estas ĉio. Ne serĉu romantikon tie, kie ĝi ne povas esti.

La viro denove ekokupis sin pri la liniilo. Li frapetis per ĝi la tablon, kaj lia tuta aspekto, lia apenaŭ videbla rideto parolis pri tio, ke li estis evidente kontenta pri siaj vortoj. Nina havis neniun ŝancon en tiu lukto. Li havis malantaŭ si sciencon, ŝi havis nur siajn proprajn konvinkojn, kaj eĉ tiuj evidentiĝis ja ne tiel firmaj, se nun la virino silentis, simple pririgardis siajn manojn. Nina ne ofendiĝis, nur sentis sin sufiĉe dep-  
rimita por arogi al si ne respondi liajn lastajn vortojn. La viro rimarkis ŝanĝojn sur ŝia vizaĝo, kaj ankaŭ li rimarkis tian klaran profilon de ŝi, tian helan, preskaŭ travideblan kaj ankoraŭ junan haŭton kovritan per efelidoj. Ŝi sidis ĉe la fenestro, tute kadrita de lumo kaj en iu momento ŝajnis al li, ne, ne bela – sankta, pura kaj senpeka. Li tiel volis tuŝi ŝian manon! Kaj ĉar li neniam rifuzis al si la plezuron de amoroj aventuroj, do sen pensi longe, ĵetis sin al ŝiaj piedoj.

– Ho mia karulino, ĉu mi povas nomi vin simple Nina? – kaj ne atendante ĝis la respondo, pluigis: – Ne malĝoju tiel, amo ekzistas, kaj iufoje evidentiĝas, ke ĝi estas tute proksime, tute apude, oni nur bezonas scii, kien rigardi.

Li diris la tuton tion, kaŭriĝinte apud la genuoj de Nina kaj kunpremante firme ŝian tremantan manon. Nina tiom ektimis tiun subitan atakon, ke ne tuj komprenis, kio okazas, kaj kiam ŝi komencis elŝiri la manon, evidentiĝis, ke estis tro malfrue. Li tenis ĝin per siaj varmegaj polmoj kaj plurfoje tuŝis ĝin per siaj lipoj. Nur antaŭ nelonge Nina estis tiel malĝojita. Ŝin maltrankviligis la vortoj diritaj de la sinjoro. Ie en ŝia animo ŝi eĉ komencis koleri pri li, ĉar li kuraĝis atenci la plej karan – Floron, ŝian teneran, amantan katinjon. Ankoraŭ antaŭ kelkaj minutoj ŝi kapablus eĉ respondi akre al li por silentigi lin, sed nun... nun Nina ne povis eĉ analizi siajn pensojn, la ĉambro turniĝis kaj se la virino nun starus, ŝi simple ne tenus sin sur la piedoj. Nun ŝi eksentis lian manon ankaŭ sur sia genuo.

Al ŝi ŝajnis, ke ŝi deziras, ke li ĉesu, sed kial do ŝi ankoraŭ diris al li nenion, ne stopis la tuton tion? Nina sidis sur sia seĝo ĉe la kudromaŝino kaj eĉ timis movi sin, timis enspiri kaj elspiri, timis rigardi lin. La sinjoro diris al ŝi, kiel bela ŝi estas kaj kiel delikata estas ŝia haŭto. Sed Nina, kiu preskaŭ ne aŭdis, ne povis kredi, ke ĉio ĉi okazis

al ŝi. La sinjoro evidente ŝatis tiun ludon, li murmuris ion, rigardis Nina-n la tutan tempon de sub siaj vitretoj, sentis, ke lia emeritaĝa karno estas tiel juna kiel lia animo kaj estis feliĉa. Nina tuta tremis, eble unuafoje dum tiom multaj jaroj ŝi sentis sin virino kaj ankaŭ estis feliĉa. Sed tiu eksplodo de emocioj, eksplodo de ambaŭ iliaj tiel malsamaj feliĉoj daŭris tute ne longe. En la koridoro aŭdiĝis paŝoj kaj poste ankaŭ voĉoj, kaj ili alproksimiĝis. Ili ambaŭ komprenis, kio okazis.

Nina etendiĝis en sia seĝo kaj moviĝis ankoraŭ pli proksimen al la tablo, penante egaligi sian spiradon, kaj la viro surpiediĝis, laŭte ekĝeminte – ŝajne lia dorso ekdoloris – kaj jam apud ŝia orelo anhelante flustris ion. Nina povis kompreni nur kelkajn lastajn vortojn: morgaŭ je la dudeka ĉe la monumento de Mickiewicz, sed tio sufiĉis al ŝi por kompreni, pri kio temas.

Ekde la reveno de la laborantinoj al la kudrejo Nina ne kuraĝis almenaŭ ankoraŭfoje rigardi lin. Ŝi aŭdis nur mallongan “dankon” kaj frapon de la pordo, kiu fermiĝis post li. Nur tiam Nina apogis sin al la dorso de sia seĝo kaj tro longe rigardadis la fenestron. La virinoj eĉ interŝanĝis la rigardojn, montrante unu al la alia la rigidiĝintan figuron de Nina, por kiu stato de revemeco estis eksterordinare malofta, kaj sensone ekhihiis. Sed Nina plue rigardadis pasantojn, malnovajn grizajn domojn kaj pensis, ke tiu strato estas vere tre bona kaj verŝajne vere pratempa.

El malnova pola domo, de kiu simple blovis per humido kaj malvarmo, la sinjoro aperis sur la superplena, inundita per agrablaj printempaj radioj strato, deskuis sian ankaŭ sen tio perfektan kostumon kaj kun miro komencis rememori ĉion, kio ĵus okazis al li. Liaj manoj poiome ĉesis tremi kaj la antaŭnelonge ardiĝinta vizaĝo estis revenanta al sia normala stato. Kio ĝi estis? Kaj kial ĝuste tiu virino? Nun la sinjoro neniel povis rememori, kio ĝuste tiel logis lin en ŝia aspekto. Li rerigardis la grizan konstruaĵon malantaŭ sia dorso kaj skuinte la kapon rapidis al la kunveno, pri kiu li ial tute forgesis kaj al kiu li jam sufiĉe malfruiĝis.

\*\*\*

Nina sidis surbenke kaj klakis per la dentoj pro malvarmo, desupre rigardis ŝin severe Mickiewicz mem, kvazaŭ malaprobante pro tro leĝera, kiel por tia venta vetero, vesto. Sed kion povis fari Nina? Ŝi simple ne povis surmeti ion alian, ol sian solan robon, kiu ne estis elŝrankigata dum kelkaj jaroj. Por almenaŭ iomete varmiĝi, ŝi frotis siajn akrajn apenaŭ kovritajn per sinteza robo genuojn kaj kunfrapis kalkanumetojn de ŝuoj speciale aĉetitaj por tiu okazo. Ŝi surmetis orajn orelingojn kaj oran ĉeneton kun kruceto, ŝminkis la lipojn, kio jam estis por ŝi tro multe da kosmetikaĵo sur la vizaĝo, kaj nun al ŝi ŝajnis, ke ĉiuj rigardis ŝin. Nina estus delonge translokiĝinta al la plej malproksima benko, kiu estas kaŝita ie malantaŭ siringaj arbustoj, se ne timus, ke li ne vidos ŝin tie. Ŝi estis veninta kvin minutoj pli frue, ŝi ŝatis ĉien alveni ĝustatempe, kaj pri tio, ke virino devus malfruiĝi al rendezuo, ŝi ne sciis, ĉar simple neniam iris al rendezuoj. Do ŝi havis ankoraŭ iom da tempo por profundiĝi en siajn pensojn. Nina denove rememoris ilian hieraŭan konversacion kaj pensis, ke li fakte pravas. Animaloj neniam egaligos al homoj. Nur homoj povas kunsenti, pardoni, amiki. Nur homo povas

## moderna ukraina beletro

tiel pasie kaj sindone ami, ami dum la tuta vivo. Nina ne povis scii certe, ĉar neniam iun en sia vivo tiel amis, kaj neniu amis tiel ŝin, sed nun ŝi sentis, ke baldaŭ ĉio ĉi okazos al ŝi. Unuafoje ŝi deziris tion. Hieraŭ veninte hejmen de laboro ŝi iel tute alie rigardis sian Floron. Ne, Nina ne intencis seniĝi de sia katinjo, simple nur hieraŭ ŝi komprenis, ke ŝia tuta katronrona amo estas malvera. Eble same Floro estis iam alkuranta al sia antaŭa mastrino, kaj post Nina ĝi alkurus ankoraŭ al iu alia. Tiuvespere Nina spektis televidon sen Floro, ŝi ne surbrakigis la katinon, ne kuŝiĝis kun ĝi sur la sofo, ne aŭskultis ĝian ronronadon. Tiunokte Nina pensis pri la morgaŭa renkontiĝo ĉe Mickiewicz kaj longan tempon ne povis endormiĝi.

Kaj jen ŝi estas ĉi tie ĉe la monumento sur la plej proksima de la monumento benko, tremante pro la malvarma vento, kaj la viro ĝis nun ne estas tie. Nina ekrigardis la horloĝon, jam estis dudek post la oka, sed ŝi eĉ ne pensis koleri, ŝi sciis, ke en granda urbo al homoj povas okazi diversaj incidentoj, ŝi tuj pensis pri malbone funkcia transporto, pri kavoj sur la vojoj, pri problemoj en la laborloko kaj ankoraŭ pri multo. Ŝi trovis dekojn da senkulpigoj pro lia malfriiĝo. Sed ju horloĝmontrilo proksimiĝis al la naŭa, des malplimultiĝis la listo de senkulpigoj, kaj kiam tiu montrilo estis jam sur la deka, la senkulpigoj tute finiĝis. Nina leviĝis de la benko kaj forlasis la placon de Mickiewicz. Neniam plu ŝi renkontis la sinjoron kun griza barbeto.

Nina eĉ ne rimarkis, ke ŝi trairis kelkkilometran distancon de la urbocentro hejmen, preskaŭ ne memoris, kiel alvenis tien. Nur memoris ŝi penetran venton kaj pezajn pensojn. La lastaj ankoraŭ kaptis ŝin. Sed tio ne estis pensoj pri malfeliĉa amo, rompita koro kaj la senindulo. Ne, en tiuj pensoj ŝi simple poiome revenis al realeco, malsupreniĝis de la alteco de siaj ĥimeraj revoj pri nobla homo. Nina iĝis la iama Nina. Sed nun en ĉi Nina aperis io nova, iu amara algusto de la antaŭnelonga seniluziigo. Ŝi plu ne povis resti indiferenta al la homoj, kia ŝi estis antaŭe. Ĉu ŝi koleris kontraŭ ili? Iomete. Ĉu ŝi sentis sin trompita? Certe. Ĉu ŝi ankoraŭ pensis, ke nur homo kapablas ami? Parte. Ĉar ŝi ankoraŭ kredis, ke homoj ne povas esti malamikoj unu al la alia. Ĝuste en tiu momento Nina envenis sian malpuran kaj, kiel ofte okazis, nelumigatan enirejon. Ŝi malfermis la stratpordon kaj paŝis certe en la mallumon, plu tremante pro malvarmo. Ŝi reflekse etendis antaŭen sian manon, esperante post kelkaj paŝoj palpetrovi parapeton, anstataŭe ŝi trafis ion strangan. Nina eĉ ne havis tempon por ektimi, kiam tio io dolorige kuntordis al ŝi tiun etenditan brakon malantaŭ ŝia dorso kaj fermis la buŝon. Nina ekkriis sensone en ies polmon aŭ pro timo, aŭ pro doloro kaj sentis, kiel iu alia, ĝis nun kaŝita en mallumo, frapis ŝin sur la ventron. Nina denove kriis, denove sensone, ŝi volis kliniĝi, sed ne povis. Iu flustris en ŝian oreton, ke ŝi ne moviĝu, kaj la virino senmoviĝis, moviĝis nur ŝiaj larmoj. Ili fluis de la okuloj sur tiun aliulan manon. Tiu dua lumigis la vizaĝon de Nina, kaj senprokraste ŝiris la orajn orelingojn el la oreloj kaj la ĉeneton de la kolo. Nun ŝi eksentis ankaŭ sangoguton sur sia kolo, kiu fluis el la ŝirita orelo. Li ektiris la sakon de ŝiaj manoj, Nina eĉ ne pensis kontraŭiĝi, senprokraste ellasis ĝin. Poste tiu, kiu estis malantaŭe, fermis sian brakumon kaj ili ambaŭ malaperis, lasante Nina kuŝi sur la malvarma cemento inter la stratpordo kaj la unua ŝtupo.

Nina plorsingultis laŭte, nun ŝi jam aŭdis sian ploron kaj estis certa, ke ĝin aŭdis

ankaŭ ŝiaj najbaroj. Ĝi longe supreniris, tenante sian manon sur la parapeto, ĉar ŝiaj kruroj simple fleksiĝis, daŭre trenis sin sur sian kvinan etaĝon, premante sian dekstran manon al la ventro, sed neniu pordo de iu loĝejo malfermiĝis. Ŝi tiris la ŝlosilon el la jakpoŝo (estis bone, ke ŝi havis kutimon meti ĝin tien) kaj malŝlosis la pordon.

En la koridoro Nina-n jam atendis Floro. Ĝi rigardis la virinon per siaj grandaj okuloj, kvazaŭ ĉion komprenante. Nina ne povis sin deteni, ŝi falis genue antaŭ la katino, brakumis ĝin kaj ploris, kisis ĝian moletan harojn kaj denove ploris. Ili ankoraŭ longe kuŝis tiel duope en la koridoro, ĝis kiam Nina trankviliĝis kaj treniĝis en la banĉambron. Floro atendis ŝin ĉe la pordo, kaj kiam Nina sursofiĝis, sidiĝis apude surplanke.

Nina ne povis pri io pensi, ŝi sentis nur, kiel doloras ŝia ventro, kiel doloras la lezita orelo kaj la genuo estas furioze tordata profetante la veterŝanĝon. Larmoj kvankam se malofte, sed ankoraŭ verŝetis el ŝiaj okuloj. Al Nina estis tiel amare, kiel neniam estis. Ŝi rompis sian bazan regulon, kaj vivo donacis pro tio al ŝi teruran aventuron. Ŝi ne volis kompati sin, sed kompatis. Ŝi ĝojus ekdormi pli rapide kaj forgesi pri ĉio, sed pro la neeltenebla doloro pri la dormo al ŝi restis nur revĵi. Subite Nina sentis, ke Floro saltis al ŝi sur la liton. La katino tiom mallaŭte tenere murmuris... Nina ĉiam amis tiun sonon pli ol ajnan muzikon. Kutime Floro kuŝiĝis, volviĝinte bule, proksime de la kuseno, Nina pensis, ke tiel estos ankaŭ nun. Sed ŝi eraris. Floro kuŝiĝis ĝuste sur la malsanan genuon. Nina sentis varman lanugan korpeton, sentis ĝin spiri, kaj ĉio tio tiel trankviliĝis ŝin, tiel lulis. Jam ie en duondormo Nina komprenis, ke jam doloras nek ŝia genuo, nek ventro, nek orelo, ke ĝenerale nenio plu doloras kaj maltrankviligas. Ŝi sentis jam nek bedaŭron, nek ofendon, nek seniluziiĝon, sed nur tion, kiel forte ŝi amas Floron kaj kiel forte Floro amas ŝin.


**Elukrainigis Petro Palivoda**

Tradukite laŭ la eldono:

Христина Козловська, Коштовніше за золото,

Брустурів, "Discursus", 2015.

**Ilustraĵoj de Natalia Pendjur**



## Legu en la sekva numero de nia gazeto:

- ◆ pri la talenta poeto Jurij Klen – germano laŭdevene kaj ukraino spirite, reprezentinto de la literatura fluo „Neoklasikuloj“, kies nomo por pluraj jardekoj estis fortstrekita el nia kulturo per komunisma reĝimo. Ĉi-jare ni festas 125-an datrevenon de lia naskiĝtago;
- ◆ brilan artikolon de Viktor Jaskovec pri Ivan Kosinin – grafikisto kaj virtuoza violonisto, la unua ilustrinto de „Ukraina Stelo“;
- ◆ interesajn informojn pri traduko de la poemo de Ivan Franko „Moseo“ en Esperanton kaj pri verkoj de ukrainaj verkistoj, esperantigitaj far’ Vasil Bobinskij;
- ◆ rakonton pri plej interesaj eksponaĵoj de la memoriga domo-muzeo de Oresto Kuzma en Kolomeo.

## Transsendu nian gazeton al viaj konatoj kaj geamikoj enlande kaj eksterlande!



## Mendu librojn kaj gazetojn

„Ukraina Stelo“, p.k. 26, Lucko-18, UA-43018, Ukrainio  
ĉe Niko Voloŝin laŭ la retadreso: [niko\\_helianto@yahoo.com](mailto:niko_helianto@yahoo.com)